

VERDA STELO

GAZETO ESPERANTISTA

LA MALKARA MONATA ORGANO INTERNACIA DE ĈIU ESPERANTISTO

Abono.

Simpla jarabono 2.50 sv. fk.
Kolektivaj abononj al unu adreso: minimume 5 abononj po 2.— sv. fk.
minimume 10 abononj po 1.50 sv. fk.; minimume 25 abononj po 1.20 sv. fk.
La prezoj validas nur ĉe antaŭa pago por tuta jaro. Ĉe almaniera pago
(monata, kvaronjara k. a.) unu numero kostas 0.25 sv. fk., 5 ekz. de unu numero
po 0.20 sv. fk., 10 ekz. po 0.15 sv. fk., 25 ekz. po 0.12 sv. fk.
Pagante per agento, aldonu 20% por perado.

Reklamo.

Anoncoj: po unucentmetra kolonero (8,5 cm larĝa) egalvaloro de 3.— sv. fk.
Anoncoj (nur kontraŭ antaŭa pago): po enpresoj kaj vortoj (aŭ mallongigo)
egalvaloro de 0.10 sv. fk., minimume 1.— sv. fk.
Rabato: 5 foje 10%, 6 foje 15%, 12 foje 20%.
Pagante per agento, aldonu 20% por perado.

Adreso.

Heroldo de Esperanto
Horrem bei Köln (Germanio)

Fako: Verda Stelo.

Redaktoro: Teo Jung

Kunlaborantoj en la tuta mondo.

Diverslandajn valutojn

ni akceptas je sekvanta kurzo:

1.00 svisa franko = 0.06 arg. peso, 1 angla penco, 0.14 aŭstra ŝilingo, 0.14 belgo,
0.16 braz. milr., 3 bulg. levoj, 0.65 ĉeĥ. krono, 0.07 1/2 dana krono, 5 est. markoj,
0.80 finna marko, 0.50 fr. franko, 0.08 germ. marko, 1.80 gr. drakmoj, 0.12 hisp. peseto,
0.11 pengo, 0.25 itala liro, 0.04 jap. jeno, 1.10 jal. dinaroj, 0.10 latva lato,
0.20 litova lido, 0.06 nederl. guld., 0.08 norv. krono, 0.17 pola zloty, 0.40 port. eskudo,
4 rum. leoj, 0.07 1/2 sveda krono, 0.04 turka funto, 0.02 urugv. peso, 0.02 usona dolaro.

La diversajn valutojn ni akceptas nur el la koncernaj landoj, sed el ĉiu lando ni
akceptas pagon per sv. fk., germ. rmk., us. dolaro, angla funto, nederl. guldeno
aŭ sveda krono.

N-ro 12

Decembro

1927

Antaŭ la Festo de la Libro.

Librofesto en Esperantujo!

Kiam meze de decembro naskiĝtag' de l' Majstro venos,
Oni en la tuta mondo certe kore ĝin solenos:
Oni el la estinteco okazaĵojn rememoros,
Oni kantos, parolados, kortuŝite eble ploros. —

Certe, je la Majstro inda estos tia rememoro:
Esperanto-Fundamento restas ĉiam: **Homa koro!**
Kaj la tempoj jam pasintaj tiom multe ja valoras,
Ĉar el ili gravaj verkoj por la estontec' ekfloras:


Ĉiulandaj homoj verkas, ke la Zamenhofa verko
Por fratiĝo de l' homaro kresku je eterna kverko!
Pli ol kvin mil belvolumojn ili kreis ardanimem,
Sed — je aĉetite — tiuj kuŝas en librejo ŝime!

Kiam meze de decembro naskiĝtag' de l' Majstro venos:
Librofesto ĝi fariĝu! — Ĉu vi inde ĝin solenos?
Jam tro longe la librejoj kun la Esperantaj verkoj
Estas por vivantaj libroj kvazaŭ nur amaso-ĉerkoj. —

Kiam meze de decembro naskiĝtag' de l' Majstro venos,
Ĉiuj ni — mi nun esperas — nian devon plenkomprenos:
Librofeston ni aranĝu sur la vasta tero ronda:
Por la libroj Esperantaj de l' eldonistar' tutmonda!

Otto Flatauer,

Direktoro de la Esp. Lernejo
de Esp. Unuiĝo Berlin.



... Kie la palmoj kreskas kaj kie mirigaj floroj floras en
neniam vidita belegeco, kie lunbrillumataj ondetoj ludas
ĉirkaŭ beate kvietaj insuloj, kie de sur graciaj turoj kaj
grandiozaj kupoloj de marmoraj palacoj salutas oraj globetoj
reprezentantaj la Simon-Venkanton, — tie kuŝas la „lando
de l' Feliĉuloj”, per gigantaj montegoj rondronde kvazaŭ
hermetike fermita kontraŭ la cetera mondo. Sed kaptas
tento la korojn de l' feliĉaj junuloj: ili volas vidi, kio troviĝas
post la giganta montegaro, ili volas riski la aventuron trans-
grimpi la „Muron de Dio”, kiel en la „lando de l' Feliĉuloj”
oni nomis la altan montaron, por penetri en la „landojn
de l' Fantazio” — la „landojn de la grandaj sorĉistoj”, pri
kiuj en la „lando de l' Feliĉuloj” cirkulas mirigaj legendoj.
Kaj tiuj landoj ja estas Ameriko kaj Eŭropo kun siaj mil kaj
mil mirakloj de l' moderna scienco kaj tekniko...
Ĉi-supra bildo estas reprodukto de ilustraĵo el la originala
Esperanto-romano „Landoj de l' Fantazio”, de Teo Jung,
ĵus aperinta en la eldonejo de Heroldo en Horrem bei Köln.

Tra la mondo.

Dum la skribado de tiu ĉi artikolo en Genevo
denove okazas konferenco de la **malarmada komisiono**
— jam la kvara. Interese estas, ke nun ankaŭ parto-
prenas rusa delegacio. Ĝi prezentis malarmadan
planon, postulante la tutan forigon de ĉiuj pormilitaj
armadoj kaj ĝian laŭgradan efektivigon en la daŭro de
kvar jaroj, t. e. la eksigon de ĉiuj trupoj, la detruon de
ĉiuj provizoj je armiloj, municio kaj kemiaj militiloj,
la plenan malkonstruadon de militŝiparo kaj milit-
aviadilaro, la detruon de ĉiuj fortikaĵoj, de ĉiuj apog-
ejoj por ŝiparo kaj aviadilaro, la malfunkciigon de ĉiuj
specialaj armilfabrikoj kaj diversajn leĝajn rimedojn.
Ĉu la rusa deklaro havos praktikan efikon je la
daŭrigo de la malarmadaj intertraktoj, pri tio oni
rajtas forte dubi.

Jam la franca reprezentanto Paul Boncour deklaris,
ke la rusa vidpunkto estas tre radikala sed ankaŭ tre
simpla, eĉ tro simpla; ke ĝi ne konsideras la ĉefan
kaŭzon, kiu malhelpas la laborojn de la komisiono,

nome la mankon je internacia spirito; ke sub la
ekzistantaj cirkonstancoj estas neeble malgrandigi
la armadojn, ne antaŭe havante novajn garantiojn
por la sekureco — ekvivalenton por la grado de
sekureco, kiun rezignus la ŝtatoj, malgrandigante
siajn armadojn; ke sen internacia organizo de l'
sekureco oni ne povos atingi internacian interkom-
preniĝon.

Post Paul Boncour parolis la germano grafo
Bernstorff, akcentante la interkonsenton inter la
franca kaj rusa vidpunktoj: ke ambaŭ potencoj
estas pretaj per ĉiuj siaj fortoj apogi la aferon de l'
malarmado. Li atentigis, ke — kvankam hodiaŭ oni
opiniis la rusan proponon radikala — jam Wilson
havis la saman penson, kiun Litwinow eldiris por la
rusa delegacio. Tamen pro manko de tempo li re-
komendas prokrasti la diskutadon pri la rusa de-
klaracio.

Ankaŭ la ĉeĥo Beneš diris, ke la rusaj pensoj ne
enhavas ion esence novan; sed ke la fakto, ke pro-
vizore oni jam rezignis ilin, estas pruvo por tio, ke
ili estas ne efektivegeblaj en la praktiko.

Interesan glason pri la malarmado enhavis
„Daily Express”, montrante hipnotiston, kiu al la
milita dio Marso sugestas: „Vi fariĝas ĉiam pli
malgranda kaj pli malgranda kaj pli malgranda!”
Sed Marso respondas, ŝajne amuziĝante: „Bone,
profesoro; sed mi ankoraŭ ne povas rimarki tion!”

Li estas prava: oni ankoraŭ ne rimarkas ian
malgrandiĝon de la ĝeneralaj armadoj. Kaj la milit-
danĝero restas kiel antaŭe. La saluto de la anĝeloj
ĉe la naskiĝo de Kristo: „Paco sur Tero!” ankoraŭ
ne efektiviĝos en proksima tempo. La „bona volo”
mankas ĉe multaj. Kelkaj ĝin havas; sed dum ĝi ne
fariĝos ĝenerala propraĵo, estos nenio eserebla.
Tial devas esti plej nobla tasko de ĉiu „bonvolulo”
helpi ĝeneraligi la „bonan volon”. Kaj ni **esperant-
istoj**, ĉe kiuj (kun malmultaj esceptoj) oni povas
supozi tiun „bonan volon”, eĉ unuvice klopodu en
tiu direkto. „La nepoj nin benos!”

Observanto.

Tra Esperantujo.

Esperanto en malproksimaj landoj.

„La Suda Krucio” raportas en ĉiu numero pri
novaj sukcesoj de Esperanto en **Aŭstralio**. Parol-
adoj kaj kursoj okazas ĉi la ĉefaj urboj de Aŭstralio
kaj Nova Zelando kaj ĉe diversaj aŭstraliaj radio-
stacioj.

Al koresponda kurso en **Hinujo**, gvidata en
Shanghai, aliĝis jam ĉ. 300 partoprenantoj. Ankaŭ
en Kanton Esperanto progresas; tie lernas 300 kurs-
anoj en Ĉin San Universitato. Vesperkurso de
Tung Shan Esp.-Societo en la sama urbo parto-
prenas pli ol 100 personoj. En Ĉinkiang fondiĝis
nova grupo — La eldonejo de Heroldo en Horrem
bei Köln (Germ.) eldonis kiel n-ro 2 de sia Ilustrita
Biblioteko modernan finan dramon „Ribelemaj vir-
inoj”, tradukitan de s-ano Chun en Shanghai. La
sama tradukis ankaŭ, el Esperanto en finan lingvon,
la „Altan kanton de la Amo” de Teo Jung kaj publik-
igis ĝin en gazeto „Esp. Studento”.

El **Japanujo** oni raportas pri esp. kongresoj, parol-
adoj kaj novaj kursoj. Du gravaj japanaj medicinaj
revuoj utiligas Esperanton: unu publikigante la re-
sumon en Esperanto, la alia akceptante esperantiston
kiel ĉefredaktoron.

Ankaŭ en **Suda Ameriko** la movado plivigliĝis.
En Asuncion fondiĝis Paragvaja Esp. Ligo. Kursoj
okazas en urboj de Argentino, Brazilo kaj Urugvajo.

Denove geedziĝo per Esperanto.

La 27-an de novembro je 11 h. geedziĝis en Tal-
linn (Estonio) ĉefa samideano Antonie Chlumsky,
naskita Kubikova, kun estona samideano s-ro Kristoph-
Ferdinand Reim. La geedziĝo ne okazis en preĝejo
sed en urba oficejo de Registrado de familia stato, kiu
maniero nun en Estonio estas pli grava ol preĝeja
ceremonio. Ĉar la geedziĝintoj ne konas la gepatran

Antaŭ la Festo de la Libro.

Ankoraŭ nur kelkaj tagoj pasos, kaj la Festo de
la Libro ĉeestos — la festo, kiu en tiu ĉi jaro
unufoje estas aranĝota honore al nia **genia Majstro
D-ro Zamenhof**, okaze de la datreveno de lia naski-
ĝa tago la 15-an de decembro. Ĉu kaj ĝis kiu
grado la festo sukcesos, tio dependos de la gesam-
ideanoj mem. Ni devas konstati, ke nia unua alvoko
ne havis la atenditan sukceson, kaj tre supozeble
tiuj konkursintoj gajnos la premiojn, kiuj divenis
minimuman nombron da vendotaj libroj (laŭ nia
prospekto aldonita al la novembra numero de Verda
Stelo). Sed multaj skribis, ke la 5-a de decembro
estas tro frua tempolimo, kaj ke ni certe havus
bonan sukceson, se ni fiksus la tempolimon je pli
malfrua dato, ĉar la plimulto de la gesamideanoj
mendos sian libron aŭ siajn librojn nur je la Tago
de la Libro mem, kio estus ankaŭ plej konforma
al la origina ideo de la aranĝo. Facile konvink-
iĝinte pri tia rezonado, ni decidis plilongigi la
mendotempon, tiel ke

la favorprezoj validos ankoraŭ ĝis la 20-a de decembro.

Tamen ni rekomendas mendi kiel eble plej frue,
ĉar ĉe mendoj alvenontaj malfrue, ni ne povos gar-
rantii, ke la mendontoj ricevos la librojn ankoraŭ
antaŭ Kristnasko.

La premioj en la Konkurso (vidu la novem-
bran prospekton!) ricevos la promesitajn librojn
kiel eble plej baldaŭ; iliajn nomojn ni publikigos en
la januaro numero de Verda Stelo, kun la rezultato
de la Konkurso kaj kun tiu de la Librotago mem, tiom
kiom ĝi rilatas nian propran eldonejon.

Kaj nun, gesamideanoj, uzu la lastajn tagojn por
mendi viajn librojn! La prospekto, aldonita al la
hodiaŭa numero de Verda Stelo, indikas al vi la plej
rekomendindajn librojn. Sed, kompreneble, ni liveros
al vi ankaŭ ĉiujn aliajn verkojn ĝenerale haveblajn
en Esperantujo.

Gesamideanoj tutmondaj! Uzu la favoran okazon
por pliriĉigi vian bibliotekon per interesaj kaj valoraj
verkoj! Kuraĝigu, per via aktiva partopreno en la
Librofesto, la esperantistajn verkistojn kaj eldonistojn,
ke ili ne laciĝu en sia klopodado evoluigi la Espe-
ranto-literaturon je potenca faktoro en la propagando
por la ideo de lingvo internacia!

**Kunhelpu ĉiu, ke la unua Festo de la Esperanta
Libro fariĝu grandioza propaganda sukceso por nia
kara afero!**

Ni bondeziras

niajn legantojn okaze de la venontaj festotagoj, precipe niajn kristanajn amikojn pro la Festo de Kristo sed ĉiujn pro la Nova Jaro.

Kvarlingva teksto

(esperanta, angla, germana, franca) denove aperos en la januara numero.

lingvon unu de la alia, oni devis uzi iun trian lingvon, — kaj helpis, kompreneble, Esperanto. Jam antaŭe ĉio necesa estis tradukita Esperanten, kaj ĉar la gvidanto de la ceremonio, s-ro R. Valter, ne scipovas nian lingvon, kiel interpretisto funkciis oficisto de la sama oficejo, s-ano V. Aveson.

Sajnas, ke tio estas la unua fojo, ke esperantlingva geedziĝo okazis ne ĉe eklezio, sed ĉe civitana institucio.

Hejma lingvo de la geedziĝintoj restas Esperanto. Certe, la tuta verda popolo sendas varmajn salutojn kaj bondeziraĵojn al la nova esperantista geedza paro.

Naciaj gazetoj raportis pri la okazintaĵo.

Raportis M. Grigorjev.

Esperanto en la Universitato de Genève.

Laŭ informo de la ĝenerala sekretario de Int. Centra Komitato, la universitato de Genevo decidis oficiale enkonduki altan instruadon pri Esperanto en sian beletristikan fakultaton. La registaro de la Respubliko de Genevo vokis D-ron E. Privat por regula instruado en la universitato pri historio kaj instruometodoj de Esperanto dum la venontaj du jaroj.

Detruo de la Esperanto-kverko.

En n-ro 45 de 11-a de novembro, Heroldo publikigis informon, kiun certe la tutmonda esperantistaro akceptis kun indigno kaj doloro: senhontaj bubaĉoj detruis la Esperanto-kverkon, plantitan dum la Jubilea kongreso en Zoppot (Danzig). Ni esperas, ke oni sukcesos kapti la krimulojn, kaj ke anstataŭ la detruita baldaŭ estos plantata nova kverko.

Verda Semajno.

En Bulgarujo okazis en la nuna jaro refoje tiel nomita Verda Semajno, t. e. semajno, dum kiu oni propagandis Esperanton tra tuta lando kaj per ĉiuj rimedoj. Kiel rezultaton oni povas raporti novajn kursojn en diversaj urboj kaj vilaĝoj.

Ni ludu Esperante.

Cambroludoj por grupoj.

Tiom ofte la novaj adeptoj, speciale la junuloj, perdas la intereson pri la lingvo post lernado. Tiel ofte ŝajnas al ili, ke la lingvo estas serioza malgaja afero.

Sed tia stato tute ne estas necesa; ekzistas multe da ludoj, kiuj ne nur amuzas, sed ankaŭ donas valoran ekzercaĵon pri parolo.

Permesu al mi, do, citi kelkajn, esperante ke, dum la venonta kristnaska festo, ili utilis al rondo, kiuj deziras alporti amuzon al siaj membroj.

Trovu la objekton! Iu persono elektas sekrete objekton en la ĉambro. La celo de la partoprenantoj estas eltrovi la nomon de la objekto. Vice, ĉiu estas permesata demandi al la elektanto, kaj li devas respondi aŭ „Jes” aŭ „Ne”.

Funebros naturo.

Argente brilas en la val'
Ekfrostiĝinta lago.
Rebrilas el glacikristal'
La pala lum' de l' tago.

De neĝaj ilokoj en abund'
Pleniĝis kamp-areno,
Kovriĝis vasta kampa grund'
De ŝirma neĝ-kuseno.

Aŭdiĝas krioj en aer'
Formortas tra l' silento;
Grakadas korvoj en mizer'
Sub nuba firmamento.

Arbaron kaŝas duonhel'
De griza lunkonturo.
Sunorfa iĝis la ĉiel' —
Funebras la naturo.

J. Reisinger, Genève.

Senindulga sorto.

De Rujena Lvobodova.

La pentristo Ŝvajger desegnis iam bildojn laŭ arabaj fabeloj. Unu el ili prezentis etan arabon kun turbano irantan armita tien kaj reen antaŭ kastela pordego. Li estis nana*) vireto kun grandega kapo kaj zorgokonsumita vizaĝo kaj nomiĝis Muk.

Enloĝiĝis en nian strateton malriĉa virino kun infano, malgranda filineto. Tiu ĉi virino estis vendistino, laboranta la tutan tagon, kaj ŝia infano, antaŭtempe maljuniĝinta, portanta pene sian grandan kapon sur maldikaj sultretoj, sidadis sur ŝtona sojlo de malnova dometo. Mi rememoris tiun „Muk” de Ŝvajger kaj tiu bildo kunfandiĝis en mia imago kun la malgranda, kompatinda knabino, kiun ŝia patro forpelis kune kun

*) Nano = malgrandulo.

Ekzemple, oni povas demandi: „Ĉu ĝi estas farita el ligno (fero, lano, kotono, papero, vitro, argilo, ktp.)?” — „Ĉu oni povas ĝin manĝi (trinki, bruligi, fleksi, tranĉi, porti kiel veston, fermi, ktp.)?” — „Ĉu ĝi estas sur la planko (muro, kamenbreto, tablo; en tirkesto, paperujo, skatolo, ŝranko, ktp.)?” — „Ĉu ĝi estis kvadrata (rektangula, ronda, ovoforma, ktp.)?” — „Ĉu ĝi estas mola (malmola, bonodora, bongusta, ktp.)?” — Se, post iom da demandado, oni pensas ke oni ĝuste divenis la nomon de la objekto, oni demandu rekte: „Ĉu ĝi estas libro (spegulo, broso, vazo, bildo, fotografajo, ktp.)?” — Tiu, kiu unue ĝuste divenas, havas la rajton elekti alian objekton.

Varianto de ĉi tiu ludo estas la sekvanta:

Mi estas famulo. Oni aranĝu seĝojn en rondo, metante unu seĝon en la mezon. Persono sidiĝas sur la meza seĝo kaj diras: „Mi estas famulo.” La partoprenantoj devas diveni, kiun famulon li reprezentas. Ĉiu, laŭvice, estas permesata demandi. „Ĉu vi estas viro (virino, infano, plenaĝulo, junulo ktp.)?” — „Ĉu vi estas angla (germana, franca, hispana ktp.)?” — „Ĉu vi ankoraŭ vivas (mortis delonge, antaŭ ne-longe ktp.)?” — „Ĉu vi estas princo (komponisto, verkisto, skulptisto, militisto, aktoro, esperantisto, ktp.)?” — Fine: „Ĉu vi estas Napoleono, D-ro Privat, Reĝo Georgo V-a, nia sekretariino, s-ro Karlo Chaplin ktp.)?” — Kompreneble, la divenanto okupu siavice la mezan seĝon.

Iom pli serioza estas:

La radikkonkurso. Ĉiu ludanto havu pecon da papero kaj krajonon. Gvidanto elektas literon, ekzemple „R”. Tiam ĉiu devas skribi kiel eble plej multe da radikoj, komencantaj per tiu litero: rat, ran, rif, rul, ripar, rond, ktp. Post kelkaj minutoj, eble dek aŭ dek kvin, ĉiu devas kalkuli, kiom da radikoj li estas skribinta. Tiu, kiu skribis la plej multon, elektu alian literon, kaj la konkurso rekomencu.

Inter la ludoj, kiuj ankaŭ instruas, ni iom ridu. Jen du ridigaj ludoj:

Jetu la rideton! La geludantoj sidiĝu en rondo. Tiu, kiu ekkomencas, ridetas. Tiam, ankoraŭ ridetante, li diras „S-ro X — jen rideto por vi!” Li pasigas la manon preter la buŝon, kvazaŭ prenante la rideton en la manon, kaj kvazaŭ ĝin jetas al la elektita ludanto; samtempe li devas ĉesi rideti. Tiu, al kiu la rideto estas jetita, devas kvazaŭ ĝin kapti, diri: „Mi dankas, s-ino Y — mi ĝin portos!” meti la manon al la buŝo, kvazaŭ surmetante la rideton, kaj samtempe komenci rideti. Li devas daŭri rideti, ĝis li forjetas la rideton al alia ludanto. Tiu, kiu ridetas, post kiam li forjetis la rideton, aŭ antaŭ ol li surmetas rideton, aŭ ridetas, kiam li ne estas petata, devas forlasi la rondon. La ludo daŭras, ĝis restas nur unu ridetanto.

Varianto de ĉi tiu ludo estas:

Ridado. Oni sidiĝas sammaniere. Iu jetas tuketon en la aeron, kaj ĉiu devas ridadi. Tuj post kiam la tuketo falis teren, ĉiu devas aspekti serioza — kiuj daŭrigas ridi, devas forlasi la rondon.

Ludo tre favorata de infanoj anglaj (kiun ĝuas ankaŭ la plenaĝuloj) estas:

Muzikaj seĝoj. Oni aranĝas seĝojn en rekta vico, alterne antaŭe kaj dorsantaŭe, uzante unu seĝon malpli ol estas ludantoj, t. e. se oni havus dek seĝojn, oni komencu kun dek-unu ludantoj.

Oni ludas gajan melodion, kaj la ludantoj marŝas vice ĉirkaŭ la seĝojn. Subite, sen ia signalo, la muzikludanto ĉesu. Ĉiu devas okupi sidlokon. Kompreneble unu restas — tiu devas forlasi la ludon. Tiam oni forprenas unu seĝon, kaj la muziko rekomencas — kaj subite ĉesas. Alia restas senseĝe — tiu ankaŭ devas forlasi la ludon. — Oni forprenas alian seĝon, ktp., ĝis restas nur unu seĝo. Tiu, kiu povas sidiĝi sur ĝin, venkas. Se la muzikisto estas ruza, li povas

ŝia patrino, ĉar la infano estis malbela kaj malsana. Mi konatiĝis kun la etulino kaj venigis ŝin ĉe min. Ofte ŝi rakontis al mi siajn strangajn imagojn. Ŝi atendis ĉiutage grandajn militojn.

„Ni vekiĝos,” diris ŝi, „kaj ĉevaloj ekrigardados en niajn fenestrojn. Marŝados trupoj, kaj ĉio post ili ŝanĝiĝos. Ni ne estos plu malriĉaj kaj manĝados dufoje ĉiutage.”

Si revis pri iu granda liberigo el sia malgaja situacio. — Mi venigis la knabinon ĉe min, laŭlegis al ŝi fabelojn de Andersen, fabelon pri ĝiba infaneto, de kiu falis skvamo kaj aperis flugiloj, kiuj igis forflugi la infaneton al ĉielo.

Si ne aŭskultis tiun belegan sentimentalan, sed ĝemetadis:

„Vi havas altajn ĉambrojn, sed la niaj estas malaltaj. Kiam mi estos granda, mi funkcios ĉe vi kiel ĉambristino kaj tiamaniere mi ĝuos ankaŭ altajn ĉambrojn. Sed ĝis tiu tempo okazos grandaj militoj kaj mortigos vin, ĉar vi havas altajn ĉambrojn kaj ni kontraŭe malaltajn; ili forprenos de vi ĉion por doni ĝin al ni. Kaj tion oni nomos justecon! Kaj patrineto ne sidos plu en foirejo, frostotremante dum vintro, sed ŝi estos tiam en viaj ĉambroj!”

Muk parolis sarkasme ridetante kaj per amare streĉitaj lipoj.

Okaze de Kristkorpa festo ŝi vendadis sur placo Hradčani florkronetojn, kiuj estis kunmetitaj el roza kratago. Kiam ŝi poste venis al mi, ĉagrene ŝi rakontis:

„Estis tie ankaŭ unu ĝiba knabino. Si estis vestita per silka robo. La virinoj diris, ke ŝia patrino re-kudris ĝin el sia edzeca vesto por kaŝi tiun ĝibon. Ho, mi volus havi alian korpon. Mi ankaŭ estas kriplulino. Tion ili kriaciis al mi!”

Si ekploris. Kaj la plorada kraketis en ŝia mal-larĝa, konvekso brusteto kvazaŭ pizetoj en fadenbulo.

Vintre ŝi gluadis kun la patrino paperajn ĉenojn, kaj okaze de Kristnaskaj tagoj ili ambaŭ vendadis la ĉenojn sub la arkaĵo.

treege gajigi la ludon, rapidante kaj malrapidante, kaj kvazaŭ ĉesante ktp.

Tre bona por ambaŭ la memoro kaj la vortaro estas:

Kiom vi memoras? Oni metas sur pleton kolekton da malgrandaj objektoj, ekz. monerojn, tranĉilon, poŝtmarkojn, librojn, kotonbobenojn, rutilon, pinglojn, juvelojn, horloĝon, cigaron, alumetojn ktp. Oni povas ilin rigardadi dum du minutoj, post kiam oni ilin kovras per tuko. La ludantoj devas skribi sur paperon kiom eble plej multe da objektoj, kiujn ili povas rememori. Tiu venkas, kiu ĝuste skribas la plej grandan nombron da objektoj.

Jen alia amuziga ludo, kiun mi nomas:

Adjektivoj. Antaŭ la kunveno iu energia kaj imagema persono preparu rakonton. Antaŭ ĉiu propra nomo kaj substantivo li lasu spacon. Ĉe la kunveno ĉiu estas petata, laŭvice, sugestita (kompreneble tute hazarde) adjektivon, kiu estas enmetita en unu el la spacoj. Kiam ĉiu spaco estas plena, la gvidanto laŭlegu la rakonton. Ekzemple: Unu parafinan tagon mi promenis sur la ĉiela strato, kiam subite mi ekvidis verdan s-ron Schmidt. „Hola, virina sinjoro Schmidt,” mi diris, „kien vi iras?” — „Ho, malbenita profesoro,” li respondis, „mi nur promenas al la glacia urbo por vidi grasan viron kun elektra hundo.” La rakonto, kompreneble, estu multe pli longa ol la ĉisupra. Ju pli maltaŭgaj la adjektivoj, des pli ridinda la rezulto.

Ĉi tiu estas ankaŭ favorata angla ĉambroludo, facile adaptebla por Esperanto:

Konsekvencoj. Ĉiu ludanto devas havi slipon da papero kaj krajonon. Estas konsilinde elekti gvidanton por estri la ludon. La gvidanto komencas: „Ĉiu skribu nomon de sinjoro!” Ĉiu tion faras, faldas iom la paperon, por ke la nomo ne estu videbla, kaj, laŭ ordono de la gvidanto, pasigas la paperon al la proksima persono. La gvidanto tiam ordonas: „Ĉiu skribu nomon de sinjorino!” Oni tion faras, faldas kaj pasigas al la proksima persono. La gvidanto tiam demandas: „Kie ili renkontiĝis?” — kaj ĉiu devas skribi la nomon de ia loko. Oni faldas kaj pasigas kiel antaŭe. Poste la gvidanto same metas la sekvantajn demandojn: „Je kia tempo?” — „Kion li diris al ŝi?” — „Kion ŝi diris al li?” — „Kio estis la konsekvenco?” Kaj fine: „Kion diris la publiko pri tio?” — Poste la gvidanto kolektas la paperojn, ilin malfaldas, kaj laŭlegas la enhavon anekdote. Ekz.: „Profesoro Cart renkontis Kleopatron ĉe la Dek-naŭa Universala Kongreso je noktomezo. Li diris al ŝi: „Ne forgesu la akuzativon!” Ŝi diris al li: „Kiel eble plej!” La konsekvenco estis — ke „ŝi aĉetis aŭtomobilon”, kaj la publiko diris: „Ho mia kor’, ne batu maltrankvile!”

Varianto de ĉi tiu ludo estas:

Testamentoj. Por tiu ĉi ankaŭ oni bezonas slipon da papero. Komence oni skribas la nomon de iu persono, faldas la paperon kaj pasigas ĝin al la proksima persono. Tiu skribas liston da ses diversaj objektoj, donante al ĉiu numeron. Oni faldas kaj pasigas al la proksimumo, kiu skribas la nomojn de ses personoj, ankaŭ donante numerojn. — Oni kolektas la paperojn, ilin malfaldas, kaj laŭlegas. — Ekz.: Aleksandro la Granda testamentis 1. muskaptilon (al) 1. nia prezidanto, 2. radio-aparaton (al) 2. Julio Cezaro, 3. litron da biero (al) 3. la Papo, 4. infanon (al) 4. mia frato Vilĉjo, 5. kanonegon (al) 5. la pastro, 6. iom da cerbo (al) 6. mi. — Kompreneble oni devas insisti, ke la partoprenantoj ne malfaldu la paperon kaj legu tion, kio jam estas skribita — tiu tute malsukcesigus la ludon.

Jen vi havas sufiĉe da ludoj por amuzi grupon dum almenaŭ unu vespero. Mi esperas, ke vi ilin ĝuos — ni nepre ridu en nia Esperanta vivo.

W. R. Wood, Torquay.

„Ĉenoj por fremdaj arbotoj!” ironie murmuris Muk.

Mi transloĝiĝis en alian strateton, kie mi ekvidis novajn, malgrandajn amikojn, sed ankaŭ eĉ pli kompatindajn suferantinojn.

Iom poste transloĝiĝis ankaŭ Muk, kaj tiamaniere ni ne kontaktis plu.

Sed iam dum vintra vespero vizitis min fremda, proksimume 16-jara junulino, iu anemia mizerulino, kaj diris, ke ŝi serĉis min en tuta Praha.

„Mi ĝojas, ke mi trovis vin. Sinjorino Stanclova petas vin, ke vi bonvole ŝin vizitu, ĉar Marieta tre grave malsanas.”

Mi ne sciis, kiu estas sinjorino Stanclova, nek Marieta.

„Ili loĝadis apud vi, Marieta vizitadis vin kelkfoje. Kaj nun ŝi vokas vin konstante kaj volas vidi vin.”

Marieta estis do Muk.

Mi iris kun la junulino tra mallarĝaj stratetoj de Malnova urbo kaj venis en profundan korton de nigra domo, subeniris tra mallumo en kelan loĝejon, palpante sur malsekaj muroj de ŝtuparo, ĝis fine mi alvenis ĉe pordeto, kiun la junulino palpe malfermis. Sed eĉ en la ĉambraĉo ne finiĝis la ŝtuparo. Mi plue subeniris, ĝis mi troviĝis en malalta kamero kun fenestreto senpere sub la plafono. Fulgofuma, petrola lampeto iom lumigis tiun malgasteman, kavernsimilan kelon, en kiu loĝis du familioj, apartigitaj per nevidebla limlinio en du loĝejoj.

Proksime al kameneto genuis sur lito, kovrita de senorde supermetitaj, malpuraj kusenoj, Muk. La korpo de la kompatinda knabino estis ŝvelinta, la ventro plumblovita, simile al hidropsulo, ŝia vizaĝo aspektis bluetiĝa kaj ĉagrenita pro neportebla sufero.


„Ŝi diris: „Patrineto, pruntu al mi vian ŝultron, mi volas sur ĝi iomete ripozi!”

Ŝi rekonis min kaj malgajiĝis ankoraŭ pli amare:

„Mi venigis vin. Mi volas vin vidi. Mi volas, ke iu metu florkronon sur mian tombon! Neniu havas

Esperanto-Ekspozicio en Debrecen.

En novembro, s-ano J. Boczan aranĝis Esperanto-ekspoziciojn diversloke en Debrecen (Hungarujo). Plej grava estis la Esperanto-fako en la Debrecena Filatela Ekspozicio (vidu la ilustraĵojn!), por kiu la aranĝinto ricevis kiel premion antikvan valoran kandelion kaj artan diplomon, kaj la Debrecena Esp.-grupo ricevis honoran diplomon. Ankaŭ la gazetaro laŭdis la Esp.-fakon. Kelkcent homoj vizitis la ekspozicion, kaj kvardek enskribis sian nomon por okazonta kurso. Okaze de la Filatela Ekspozicio aperis ankaŭ memorlibro, por kiu s-ano Boczan verkis artikolon pri „Filatelo kaj Esperanto”.



Krom tio, bone efikis simila ekspozicio en diversaj lernejoj, ekzemple en katolika kaj en hebrea gimnazioj, en urba industrilernanta lernejo, fine por instruistoj reformistaj en la luksa ĉambrego de la Reformista Preĝejo. Cie anoncis sin lernantoj por kurso. En la hebrea gimnazio la direktoro D-ro Albert Kardos mem petis aranĝi kurson, en la industria lernejo D-ro Pal Gubjas, profesoro de hungara kaj germana lingvoj, konata poeto, mem entreprenis gvidi kurson (kun 20 partoprenantoj). En la najbara Biblioteka Palaco s-ano Boczan komencis kurson por 20 lernantoj de la Instruista Akademio. Instruisto Lajos Jambor komencos kurson por instruistoj. Li estas sekretario de reformistaj instruistoj, redaktoro

de instruista gazeto, en kiu li komencis artikolserion pri Esperanto. En la greka-katolika elementa lernejo komenciĝis vesperaj kaj posttagmezaĵaj Esp.-kursoj gvidataj de medicinstudentoj s-anoj Sandor Bako kaj Sandor Gurbei, instruisto J. Matyos kaj s-anino Julia Kiss. En Csapokert (Csapo-gardeno), je la periferio de Debrecen, s-ano S. Kovacs komencis kurson kun 25 partoprenantoj. Ĉe laboristoj komenciĝis kurso kun 40 personoj, gvidata de k-do L. Toth. Do, bonega sukceso ĉiufanke! Tre verŝajne, Debrecenaj samideanoj aranĝos ankaŭ la landan hungaran kongreson en 1928.

El Scienco kaj Tekniko.

Nekonataj gentoj.

Laŭ invito de la Scienca Akademio de USSR (Sovet-Ruslando), s-ro Genko, Prof. de Leningrada Universitato, dum 1½ monatoj esploris la finalukan lingvon, pri kiu la scienco ĝis hodiaŭ nenion sciis. Prof. Genko pasigis la tutan tempon en la Kubina distrikto en la montaro apud Sagdag kaj kolektis tre interesan materialon pri la finaluka lingvo.

Speciale grandan intereson prezentas la jeno: En la distriktoj de Giokĉaj, Nujin kaj Kubin (Aserbajĝano) vivas gento, kiun la turkoj nomas „ĥatutli”, sed ĝi mem sin nomas „gerat”. Prof. Genko konkludis, ke tiu ĉi gento sendube estas kunligita kun la antikva geografia nomo de Orienta Georgio kaj de Okcidenta Azerbajĝano: „Gereti”. Li esploris la lingvon de tiu ĉi gento kaj trovis, ke ĝi estas parenca al la lingvo de lezginoj. Li supozas, ke en antikva tempo tiu ĉi gento okupis Orientan Georgion, sed poste ĝi estas de tie forpelita de aliaj gentoj.

La Scienca Akademio publikigos la sciencan laboron de Prof. Genko.

Alian nekonatan genton oni trovis en Zakatala distrikto de Azerbajĝano. Ĝi nomiĝas „jasai” (en traduko: „fraŭlinoj”), kaj en ĝia familia vivo la virinoj ludas la ĉefan rolon.

„Jasai” estas loka nomo de branĉo de la avaroj, parolanta avaran dialekton. La „jasai” vivas en la

intermontaro super Djarom (apud Zakatal) en pitoreska regiono. Ili havas tre originalan familian kutimon: pri familiaj bezonoj zorgas sole virinoj, laborantaj por tiu celo ne nur hejme, sed eĉ ĉasante kaj kaptante fiŝojn ktp. Viroj havas preskaŭ nenian signifon en la familia vivo. La „jasai” vivas dise en la intermontaro: ĉiu vilaĝo havas ĉ. 150 domojn.

La Scienca Akademio ricevis ankaŭ sciigon de sia botanika ekspedicio, forveturinta al Kazakistano. La ekspedicio sciigis, ke ĝi trovis la tute nekonatan ĝis nun lagon Aral-Kul. Tiun ĉi lagon la ekspedicio notis en la geografia karto. En la regiono de tiu ĉi lago la ekspedicio kolektis ĉ. 220 ĝis nun ne konatajn vegetaĵojn.

En Leningrad forveturis al Nova Tero granda scienca botanika ekspedicio gvidata de Prof. Tolmačov. La ekspedicio esploras la lokan vegetaĵaron kaj post esploro de la lokaj naturkondiĉoj decidis pri la problemo, ĉu tiu ĉi insulo estas koloniigebla.

K. M. Kolobaŝkin.

Oni fotografis 15 milionojn da fiksal steloj.

Jam depost kvardek jaroj, deknaŭ observatorioj de la tuta mondo fotografis la noktan firmamenton. Ĝis nun estas fotografitaj 15 milionoj da fiksal steloj, kiuj troviĝas sur 30 000 stelkartoj. Por la homa okulo estas videblaj nur ĉ. 6000 steloj. La fotografadoj nun estas prese reproduktataj kaj publikigitaj. Astronomoj de estontaj tempoj, komparante ĉi tiujn stelkartojn kun novaj kartoj farotaj de ili, povos multon konstati pri la moviĝado de la steloj.

Se estas eble, li elektas vesperon, kiam estas pluvo kaj vento, kaj tre kontentiĝas, se unu-dufoje la vento forpelas la novan aĉetinton en la koton. Kaptinte ĝin, li brosas per la maniko, kaj kun mieno de homo, kiu sukcese plenumis malagrablan devon, iras hejmen triumfe.

Kontraŭe, la samaj personoj diras, ke virino neniam estas tiel feliĉa kiel irante por aĉeti novan ĉapelon. Ĉiu scias la proverbon: „La escepto provas la regolon,” kaj mi emfaze diras, ke estas esceptoj por tiu regulo. Mi rakontas mian timigan sperton. Tio ne ofte okazas, ĉar mi ĉiam, kiam eble, prokrastas aĉeti ĉapelon, sed okaze miaj parencoj sugestas, ke mia ĉapelo ne estas vidinda; do, se mi ne povas akiri per prunto aŭ donaco alian ĉapelon, urĝe estas, ke mi furagiĝu kaj, kun svenanta koro, rigardu la fenestrojn de la ĉapelistoj. Vane mi rigardas la brilan elmontraĵon. Se mi aĉetus iom da ĝi, mi bezonus novan mantelon, silkajn ŝtrumpojn kaj altkalkanajn ŝuojn por konveni al tiuj grandiozaj kunkudritaĵoj.

Mi reiras hejmen, sed, ho ve!, tio ne solvas la problemon. Post kelkaj tagoj mi devas ĉeesti kunvenon kaj nepre porti kapkovraĵon. Mi rigardas la malnovan kapamikon kritike. Verdire, ĝi ne estas tre bela, la plumoj ŝajnas lacaj, la rando estas iom kurbiginta; sed kiom ĝi estas komforta, kiel malpeze ĝi sidas sur mia kapo, kiel ame ĝi ŝirmas miajn okulojn kontraŭ la sunradioj! Ĝia buko rigardas min malĝoje, mi ne povas renkonti ĝian riproĉan rigardon, do rapide surmetas ĝin kaj ekiras al la plej proksima ĉapelbutiko. Pro ne perdi la kuraĝon, mi tuj eniras kaj certigis per malforta voĉo al senriproĉe vestita junulo, ke mi bezonas ĉapelon. Mansvingante li prezentas min al ŝajne laca belulino, kiu ekrigardas mian karan ĉapelon malestimege kaj montras al mi konfuzan aron da ĉapeloj en ĉiuj koloroj de l' ĉielarko. — Post forigo de mia ĉapelo, ŝi insiste uzas mian kapon kiel montrilon, frapas, tiras, kaj kirlas min, ĝis fine mi trovas la parolon, kaj certigas al ŝi, ke mi ne deziras

Du milionoj da dolaroj por muzeo. Rockefeller juniora disponigis al la registaro de Palestino du milionojn da dolaroj por la konstruado kaj subtenado de arkeologia muzeo en Jerusalemo. La registaro akceptis la proponon kaj jam intertraktas pro konvena loko por la muzeo. Nuntempe ekzistas malgranda arkeologia muzeo en la registara palaco, sed la ejoj estas tre malvastaj. Rockefeller metis la kondiĉon, ke la muzeo estu finkonstruita en tri jaroj kaj ke ĝia arkitekturo harmoniu kun la panoramo de la urbo.

Nova aergiganto.

En Howden (Yorkshire, Anglujo) estas konstruata nova aersippo, kiu havos longecon de 709 futoj, diametron de 130 futoj kaj pohoran rapidecon de 82 anglaj mejloj. La nomo de la nova aergiganto estos „R 100”.

Diversaĵo.

Ankoraŭ ekzistas aventuroj:

Li estis surstrata violonisto — li fariĝis multobla milionulo . . .

. . . sed nun li mortis en la aĝo de 65 jaroj. Lia nomo estis Louis Lombard. Li mortis en Ĝenova (Italujo), ĉe sia morto disponebla pri 21 operdomoj. Louis Lombard estis franco, sed li forlasis sian patrujon en la aĝo de 14 jaroj, veturante Amerikon per vaporsippo ŝarĝita de bruto. En Ameriko li komencis sian „karieron” kiel ĉifonkovrita surstrata violonisto. Li posedis neniam krom sia violono. Sed jam post nelonga tempo li fariĝis direktisto de unuaranga orkestro. Poste li fondis konservatorion en Novjorko kaj finacis gastludan vojaĝon de konataj aktoroj. Feliĉaj spekulacioj pligrandigis lian posedaĵon, tiel ke post nelonge li estis milionulo. Ĉe sia morto, Louis Lombard posedis inter alie luksan kastelon en Svisujo, en kiu estis instalitaj koncertejoj kaj teatrejo. La koncertejoj havis lokon por cent, kaj la teatrejo havis lokon por tricent personoj.

Kiam kaj kie oni rikoltas en la mondo?

Dum januaro en Aŭstralio, Nova Zelando, en la plej granda parto de Ĉilio kaj en diversaj landpartoj de Argentino; dum februaro en Hindujo, kie la rikolto tre ofte daŭras (pro la vetero) ĝis meze de marto; dum marto en Meksiko, Egiptujo, Persujo, Sirio; dum majo en Malgranda Azio, Ĥinujo, Japanujo, Tunisio kaj Maroko; dum junio en Kalifornio, Hispanujo, Portugalujo, Italujo, Greklando kaj Suda Francujo; dum julio en la cetera Francujo, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, Hungarujo, en partoj de Ruslando, en Rumanujo kaj Usono; dum aŭgusto en Germanujo, Holando, Belgujo kaj Kanado; dum septembro en la nordeŭropaj ŝtatoj, en Skotlando, en la nordaj partoj de Kanado kaj en Ruslando; dum oktobro en la plej nordaj partoj kaj en alte situantaj terpartoj de la norda hemisfero. En la monatoj novembro kaj decembro jam komenciĝas la rikoltoj en kelkaj preĉipe varmaj regionoj de la suda hemisfero.

El „Sonntagsglocke”, Wien, tradukis M. a. d. K.

Ĉu vi jam scias ke . . .

La aĝo de la Tero depost ĝia malvarmiĝo oni taksas je 100—2000 milionoj da jaroj.

Nove naskita infano mezuras ĉ. 50 cm. En la unua vivojaro ĝi kreskas 20—24 cm, je la fino de la 14-a vivojaro ĝi mezuras ĉ. 150 cm. Ĉe nove naskito la supra kaj malsupra partoj de l' korpo estas egale

monon. Patrineto ĉion elspezis por medikamentoj. Kaj mi devas morti. Mi ne ĝisatingos kion mi volis atingi! Mi volas do havi almenaŭ florkronon el belegaj floroj!”

Sufokaj doloroj devigis ŝin eksilenti. Sia malgranda, flava patrineto ploris.

„Ho, Dio donacis al mi kriplulinon, sed almenaŭ mi havis tiun! Kaj nun mi restos forlasita! Kaj kiom ŝi suferas, mia kara prematino, kiaj suferoj! Ke potenca Sinjoro jam kompatu ŝin!”

Muk rekonsciigis iomete, rektiĝis en siaj malpuraj, senorde metitaj kusenoj, pene spirante kaj paŭzante post ĉiu vorto, kaj per voĉo raŭketa kaj ekscitita pro pulma malsano ŝi plore diris: „Kaj poste — donu — al patrineto — groŝon — por la tomo. — Ĉu vi scias — kial mi volas havi — propran tombon? — Mi ne volas — kuŝi en ŝakto — kaj iam — tio estos baldaŭ — ĝis ĉio ŝanĝiĝos — kaj pliboniĝos — venu — mi petas vin — komuniki tion al mi! — Tie — en la ŝakto — mi eble ĝin — ne aŭdus — ke en la mondo — estiĝis — fine just-e-co.” Eta Muk, suferanto, mortis en tiu ĉi momento.

Sur la tombejo Olŝani kuŝas en verda tombeto la eta Muk. Vico de kandeletoj kelkfoje tie bruletas kaj okaze de Kristnaska festo abia arbeto, ornamita per paperaj ĉenoj, tie flirtetas. Kiam ajn mi tie haltas, ŝajnas al mi, ke ŝi atendas, atendege aŭskultas — kaj sopire atendadas. Sed mi ne scias — kion diri.

El ĉeĥa lingvo tradukis Perhak.

Mia nova ĉapelo.

Multaj personoj asertas, ke la aĉetado de nova vestaĵo aŭ ĉapelo ne plaĉas al viro; ke nur post granda hezito, li ŝteliras je mallumiĝo al butikoj. Tie li elektas ĉapelon tiel similan al la lasta kiel du pizoj en ŝelo, ŝovas ĝin sur la kapon, lasas la alian, por ke la ĉapelisto ĝin sendu hejmen en skatolo, kaj eliras.

Ĝin ajn el tiuj monstroj, mi bezonas ĉapelon kiel eble plej similan al mia ĉapelo. — „Ho! tia ĉapelo estas tute malnovmoda, provu ĉi tiun!” ŝi diris, metante sur min triangulan objekton similan al la kapkovraĵo de veturigisto de la Urbestra Moŝto de Londono. Unu ekrigardon en la spegulon igas min efi la vortojn de la virineto en la kanto: „Ho! miavorte, tiu ne estas mi!” kaj mi firme malkonsentas akcepti ĝin. Unu post alia, mi provas ĉian ĉapelon sur la tabulo, la pendigiloj kaj el la tirkesto. Kiam la vendistino iras serĉi aliajn, mi prenas ĉapelon kaj plezure trovas, ke ĝi sidas komforte. La vendistino revenante kun kolono da ĉapeloj de ĉiu amplekso kaj formo, spiras spasme kaj diras: „Sed, sinjorino, tiu estas ĉapelo por lerneja knabino!”

Ruĝigante, mi demetas la solan komfortan ĉapelon en la butikoj, por provi la novan aron, kun malespero en la koro. Unu estas tro peza, alia sufiĉe granda por tendo, tria rememorigas min pri la ĉapo mokita de Petrukio, ĉar ĝi balanciĝas kokete kiel fingringo sur la luno. Kelkaj preskaŭ estingas miajn okulojn, aliaj estas tiel multkoloraj, ke mi similas papagon el la Zoologia ĝardeno. Koscianta, ke nenio en la butikoj kontentigos min, mi fine akceptis unu kun rezigno, je prezo trioble pli alta ol mi intencis pagi.

Bedaŭrinde miaj kaĝrenoj ne finiĝis, ĉar ŝi metis ĝin en sakon sufiĉe grandan por enteni porkon, kaj mi eliris el la butikoj preskaŭ kaŝite malantaŭ ĝi. Ĉu tiel mi proklamos al la mondo, ke mi ĵus aĉetis novan ĉapelon? Kion mi faru? Eniri kaj peti, ke ili ĝin sendu hejmen? Ne, mi ne deziras renkonti tiun suferigintinon; do, firme prenante la pakadon, mi rulfaldis ĝin kaj subbrakigis ĝin. Alveninte hejmen, mi malgaje rigardas la novan akiraĵon, kaj eltrovas, ke ĝi tute bone sidas kun la antaŭo malantaŭe; do, malgraŭ ĉiu protesto, tiel mi portas ĝin. Ĉu mi ne aĉetis ĝin? Ĝi estas mia ĉapelo; do mi rajtas porti ĝin, kiel plaĉas al mi. Cetere, ĉapeloj estas farataj per kapoj, kaj ne kapoj per ĉapeloj. Emma L. Osmond.

longaj, poste la malsupra parto kreskas pli rapide ol la supra parto. En la aĝo de 14 jaroj la proporcio estas ĉ. 58:92 cm.

La cerbo de eŭropa viro pezas ĉ. 1362 gramojn, tiu de eŭropa virino ĉ. 1219 gr. La cerbo de la finoj estas pli peza, la cerbo de la negroj malpli peza ol tiu de la eŭropanoj.

En la antikva Egiptujo, la urbo Pelusium ĉe la enfluo de la Nilo en la maron estis konata kiel bier-urbo.

La eŭkalipt-arbo estas la plej valora pliboniganto de la aero en marĉaj regionoj.

La finoj aplikis inokuladon kontraŭ infektaj malsanoj jam en la 11-a jarcento. La inokulado okazas ĉe ili en la nazon.

La haro de virino kreskas en duona jaro je ĉ. ses centimetroj.

En la regionoj de l' eterna neĝo vivas ankoraŭ dekunu familioj da papilioj kun 32 specoj.

Ranoj havas tre persistan vivon. El mortigitaj serpentoj kelkfoje elrampas vivantaj ranoj, kies malantaŭaj kruroj jam estas digestitaj.

La nombro de la konataj mondlingvaj projektoj estas pli ol kvincent.

Evoluo de la prezo por diamantoj.

La amerika geologo Sidney Ball publikigis artikolon pri la evoluo de la prezo por diamantoj. En la jaro 1750 la prezo estis ĉ. 40 dolaroj po karato. En 1901 la prezo por simila ŝtono estis po karato ĉ. 225 dolaroj, en 1914 ĝi estis 300 dolaroj, kaj nun ĉ. 450 dolaroj. La debito de diamantoj dum unu jaro estis komence de la 19-a jarcento ĉ. 2,5 milionoj da dolaroj, en la mezo de la 19-a jarcento ĝi estis ĉ. ses milionoj da dolaroj, kaj nuntempe ĝi estas ĉ. 80 milionoj da dolaroj.

Por komencantoj.

La vintro.

Ĉiu sezono de la jaro havas siajn agrablajn kaj siajn malagrablajn flankojn. Tiel ankaŭ, la vintro havas la siajn. Malagrablaj dum la vintro estas la akra frosto kaj la oftaj neĝblovadoj, la mallongaj tagoj kaj la longaj noktoj. Precipe por malriĉaj familioj, kiuj ne povas aĉeti lignon aŭ karbon por hejtado kaj kiuj devas ankaŭ ŝpari je lumo.

Plej multe ĝojas pri la vintro la infanoj, ĉar ili povas glitkuri sur la glacio, konstrui viretojn el neĝo kaj lude interbatali per neĝbuloj. Krom tio, en vintro falas Kristnasko — la bela festo, en kiu la infanoj kutime ricevas riĉajn donacojn. Kristnaskon oni festas per diversaj manieroj. Plej bela estas la maniero, per kiu oni ĝin festas en Germanujo, Svedujo kaj kelkaj aliaj landoj. Oni starigas en la salomon aŭ sur tablon verdan pinon aŭ abion kaj oni ornamas ĝin per brilantaj ornamaĵoj kaj per multaj diverskoloraj kandeletoj. Sub la arbon oni metas la donacojn por la tuta familio.

Kiel esperantistoj ni ne volas forgesi, ke dum decembro ankaŭ estas la datreveno de la naskiĝa tago de nia kara Majstro D-ro Zamenhof. En tiu ĉi jaro la gesamideanoj festos tiun tagon (la 15-an de decembro) kiel Tagon de la Libro, kiel Feston de la Esperanto-Literaturo. Ĉiu samideano en la tuta mondo sentu sin morale devigita, je tiu tago aĉeti almenaŭ unu Esperanto-libron. Tre bela ideo proponita de nia fama hungara poeto Julio Baghy, kaj al kiu oni povas deziri plenan sukceson. Tial voku ankaŭ ni: Vivu kaj kresku la Esperanto-literaturo!

Enigma angulo.

Solvoj el n-ro 11.

1. Humanismo, 2. Ebono, 3. Rozo, 4. Oro, 5. Legio, 6. Decembro, 7. Obolo, 8. Diferito, 9. Egiptujo, 10. Etnologio, 11. Sandro, 12. Pudelo, 13. Etero, 14. Reformacio, 15. Alpoj, 16. Nordo, 17. Telero, 18. Ombrello. — Heroldo de Esperanto.

2.

Esperanto-kantisto.

Nova enigma konkurso komenciĝos en la januara numero de Verda Stelo.

Serĉoj.

Kolekto pri bopatrino.

La tomboŝtono.

Du amikoj renkontiĝas.

— Saluton, kial vi estas tiel malgaja?

— Ĉar mi ne povas starigi memorŝtonon sur la tombon de mia bopatrino.

— Ĉu vi freneziĝis? Via bopatrino ja vivas ankoraŭ!

— Ĝuste pro tio.

La fenestro.

— Seruristo, venu rapide, ni ne povas malfermi la fenestron!

— Ĉu la afero estas tiel urĝa? Vi ja loĝas en la kvina etaĝo!

— Jes, mia bopatrino ĵus kriis, ke ŝi tuj elsaltos tra la fenestro, kaj ĝuste nun ni ne povas malfermi ĝin.

La minaco.

Edzo (post terura disputo kun la edzino): Kaj nun vi forlasos min kaj reiros al via patrino!

Edzino: Vi tre eraras. Mi vokos mian patrinon por loĝi kun ni.

Iluzio.

Unua amiko: Vi portas funebran rubandon, pro kio?

Dua amiko: Pro mia bopatrino...

Unua amiko: Sed ŝi ankoraŭ ne mortis!

Dua amiko: Ja vi scias, ke mi estas homo, kiu ŝatas la iluziojn! (El hungara gazeto.)

Dum la Tago de la Libro

Ĉiu esperantisto subtenas la originalan literaturon.

Julio Baghy:

Dancu, Marionetoj!

176 paĝa kun 12 originalaj noveloj.

Prezo: simpla broŝurita germ. rmk. 2.70
 simpla duontole bindita 2.60
 luksa tole bindita 3.70
 plus 10% aŭ franko.

Aperis ankaŭ bibliofilaj eldonoj, pri kiuj petu specialajn informojn!

Aĉeteblaj ĉe

Hungaria Esperantista Societo Laborista
Budapest VIII, József körut 9 I 3

aŭ ĉe la

Libreja fako de Heroldo, Horrem b. Köln

Kiu volas perfektigi en la scio de Esperanto kaj akiri konojn pri sennaciismo, tiu nepre legu librojn eldonitajn de SAT.

| | |
|---|----------|
| Ni legu! Brunulo. (Internacia Legolibro), originalo (3-a eldono), 112 p. 12x17 | Rmk. 1.— |
| Faŭsto, Goethe (trad. N. Barthelmess), 156 p. 11x17 | 1.20 |
| Eklumo en Abismo, H. Barbusse, 96 p. 11x17 | 0.80 |
| ABC de Sennaciismo, V. Elsudo, originalo, 60 p. 11x18 (2-a eldono baldaŭ aperos) | 0.50 |
| El la Mondbildo de l' Nova Fiziko, D-ro Reiche, 52 p. 11x17 | 0.60 |
| Malgranda Terbiblio (Prolet. Atlaso), Szeréni, originalo, 31 kartoj kaj skemoj, 25x36 | 1.80 |
| Proletaria Kantaro (74 kantoj kun muziknotoj) 180 p. 11x17 | 2.50 |
| Petro (kursa lernolibro laŭ parola metodo) 64 p. 12x17 | 0.70 |
| La Kemlo de la Universo, Prof. Fersman (trad. S. Rublev), 80 p. 11x14 | 0.60 |
| La Morto de Blanjo, J. Tousseul, 72 p. 11x14 | 0.60 |
| Tri Verkoj de Tolstoj, 78 p. 12x19 | 0.80 |
| Ruĝo kaj Blanko, L. Jvn, originalo, 68 p. 11x14 | 0.60 |
| Sekspskologio, S. Ziegler, originalo, 54 p. 11x14 | 0.60 |
| Orienta Blovo, 28 p. 14x22 | 0.40 |
| En Katenoj de la Maljusteco (Virina Krestomatieto), 40 p. 14x22 | 0.60 |
| Etiko, P. Kropotkin, 240 p. 13x18 | 1.80 |
| Karl Marx — Ila Vivo — Ila Verko, 88 p. 11x14 | 0.60 |
| Je la Nomo de l' Vivo, Izzgur, originalo, ĉirkaŭ 226 p., sur bela papero | 2.— |
| Kvardek Jaroj, jubilea kajereto, originala, 48 paĝoj, 15x22 | 0.60 |
| Propagandaj kartoj, 5 diversaj | 0.50 |

Haveblaj ĉe: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O. 27 kaj ĉe la Libreja Fako de Heroldo.

Malkara!

Bonfama!

La konata verko de Emeriko Madách

Tragedio de l' Homo

en la bonega traduko de Kalocsay nun estas havebla, bele bindita por la eksterordinara prezo de Rmk. 3.50 plus 10% aŭ franko ĉe la Libreja Fako de Heroldo de Esperanto, Horrem b. Köln (Germ.)

Ilustrita!

Bindita

Anekdotoj el Esperantujo.

La avaraj esperantistoj.

En restoracio ĉiusemajne kunvenas Esperanto-grupo. Lutage la duonan vesperon kunsidis nur du membroj, malofta okazo ĉe Esperanto-grupo! Fine venis tria kaj mirigite ekkriis: „Du, nur du!”

La pianisto, opinante ke li aŭdis germanajn vortojn, per kiuj oni volis mendi konatan dancokanton (Du, nur du = ci, nur ci), tuj ekludis tiun muzikon. Kiam li finis, la grupestro hazarde korektis ion per la vortoj: „La kapo, la kapo!” Nia muzikisto komprenis „da capo” (denove!) kaj refoje komencis la melodion, kvankam neniu aŭskultis tiun bruon. Vane li atendis, ke la grupanoj elspezu ion por li, kiel estas kutimo, kiam kanto estas mendata. Je la vesperfino li diris al la mastro, ke li ne ludos plu en ĉi tiu gastejo, ĉar la ekzemplo de la „avaraj esperantistoj” eble estos baldaŭ imitata.

Post kelkaj tagoj oni legis en gazeto: „Por restoracio estas serĉata pianisto, kiu komprenas Esperanton.”

Süssmann.

Anoncetoj.

S-roj Edgars Bite kaj Valdis Saukants, Liepaja, Kungu iela 67, Latvio, deziras korespondi per PI kaj L kĉl. Certe respondos.

S-ro B. de Lange, Rotterdam, Brabantschestr. 54, Nederlando, deziras korespondi per PI kaj L kĉl. Certe respondos.

F-ino Annie Dulf, Amsterdam, Spilbergenstr. 22, Nederlando, deziras korespondi kun eksterlandanoj poŝtkarte kaj letere.

Fraŭlo Antoni Puczka, Katowice, Warszawska 4, Polujo, deziras korespondi pĉt. kĉl.

S-ro Zygmunt Hirsberg, Katowice, Wodna 4, Polujo, deziras korespondi pĉt. volonte kun fraŭlinoj.

Juna esperantisto St. Olesik, Katowice, Warszawska 66, Polujo, deziras korespondi pĉt.

Anfikva trezoro.

Escepte estas nun okazo akiri kolekton de maloftaj libroj pri mondlingvoj, ankaŭ ĉiujn librojn de la unua epoko de Esperanto, aperintajn sub la nomo de D-ro Esperanto.

Inter aliaj:

- Lernolibroj de D-ro Esperanto, eldonitaj en Varsovio ĉe presejo Kelter:
 - por poloj, 9. 7. 1887
 - por francoj, 12. 9. 1887
 - por germanoj, 21. 10. 1887
 - por angloj, 12. 1. 1888
 - por angloj, 5. 1. 1889
 - por svedoj, 20. 5. 1889
 - por rusoj, 31. 7. 1889

binditaj kun vortaroj.

Plena lernolibro internacia (D-ro Esperanto) por bohemoj de 1890 (skribis Fr. VI. L.)

Plena lernolibro por hebreoj (preparis D. Jurevicz) 1890

Plena lernolibro kun vortaro por bulgaroj (de Bogdanov) 1890

Diversaj eldonoj por svedoj, hispanoj, latvoj, litovoj, estonoj, rusoj, italoj, el la jaro 1890

D-ro Esperanto: Dua libro de Lingvo Internacia, 1888

Aldono al la Dua libro, 1888

Rusa eldono de Dua libro, 1888

Rusa aldono al la Dua libro, 1889

Literaturo

(la unuaj eldonoj de la plej famaj aŭtoroj):
 La Neĝa Blovado de Puŝkin, trad. Grabowski, 1888

La Gefratoj, trad. Grabowski

Kondukanto internacia, kontrolita de D-ro Esperanto (ellaboris Grabowski), Nürnberg, 1890

Boris Godunov, Iliado, Fonetika Skribado (D-ro Javal), Versaĵoj en prozo, Fratoj Grimm (de Kabe)

Diversaj libroj de famuloj, kiel René de Saussure, L. Beaufront, Kabe, Boirac, Kabanov, Z. Adam, Devjatnin, D-ro Fiszer, Doktoro Kovslinski

Die Weltsprache Esperanto, germana, de W. H. Trompeter, eld. Nürnberg 1891

Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen, de L. Einstein

Volapük und Lingvo Internacia, enhavas raporton de Usona Filozofia Societo pri internacia lingvo, Nürnberg 1889

Die Weltsprache, de D-ro W. Oswald, Stuttgart

Examen Critique du Volapük, du Dr. Esperanto, présenté-par L. Einstein, trad. Demorget

Linguist. Sendependa gazeto por ĉiuj amikoj de lingvo internacia, Hannover 1896.

Multaj libroj kun subskribo de gravaj famaj aŭtoroj, same unu kun aŭtografado de D-ro Zamenhof.

Gazetoj:

La Esperantisto (unua Esperanto-gazeto), eldonita en Nürnberg de D-ro Zamenhof kaj Trompeter, jarkolektoj 1892, 1893, 1894, 1895

Lingvo Internacia, la prova ekzemplero kaj dek jarkolektoj 1895—1905, aparta Literatura Biblioteko

Literatura Almanako de 1909 kaj 1910.

Krome: La Nova Jaro (1891), Janko Muzikanto (1891), Elektitaj Fabeloj (1891), Poliglota Vade-Mecum de Internacia Farmacio, de C. Rousseau, en 9 lingvoj (bela bindo, 300 pĝ.), Principes Logiques de la Formation des Mots, par René de Saussure, Internationale Weltsprache-Akademie, Wörterbuch der Neutral-sprache, Neutral-Deutsch und Deutsch-Neutral (1902) ktp. ktp.

Multaj libroj kun adresoj de unuaj esperantistoj, stenografa raportoj kun adresoj de unuaj esperantistoj de la 1-a Kongreso en Bulonjo s. Mer.

Entute ĉ. 120 libroj, plejparte binditaj, bonstataj.

La minimuma kosto estas taksita je pli ol 2500 svisaj frankoj.

Nur seriozaj aĉetemoj, kiuj intencas preni la tutajon, turnu sin al la adreso de samideano

Adolfo Oberrotman
 Warszawa (Pollando), Krak-Przedm. 10.